BARCELONA ESPERANTO - CENTRO

CARRERAS I CANDI n-ro 34-36
Telefono. 240 25 62
BARCELONO, Katalunio, Hispanujo

JUNULARA SEKCIO DE BEC

ĜENERALA INFORMILO

N-ro 77 JANUARO 1992

# BARCELONA ESPERANTO-CENTRO

## INVITAS VIN KUNFESTI

## LA 4AN DE FEBRUARO

Okaze de la prezento de la VIDEOFILMILO "Panasonic" aĉetita de BEC. je la 19.30 h en nia sidejo en Carreras i Candi 34-36.Vi povos partopreni en la unua videofilmo.Ni atendas vian kunlaboradon.

## ĜENERALA KUNVENO DE BE-C

TAGORDO

1. Legado kaj aprobo de la akto de la jaro 1990.
2. Legado kaj aprobo de la sekretaria raporto 1991.
3. Legado kaj aprobo de la financa raporto 1991.
4. Elekto de la duono de la estraro
5. Laborprogramo por la nuna jaro:Hispana Kongreso en Merida.Universala Kongreso en Valencio.Esperanto-Kurso per videofilmo.Esperanto-Kursoj for de nia Centro.
6. Sugestoj kaj demandoj.

La Ĝenerala kunveno okazos je la 20 h. akurate.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

Miguel Vilagrán i Llorens, membro fondinto de Barcelona Esperanto Centro, forpasis la pasintan 23an de decembro.Lia esperantista agado ene de KLUBO D´AMIKOJ DE LA UNESKO en Barcelono estis mirinda kaj tre efika ĉar impulsis regulajn Esperanto- kursojn kaj la klubo partoprenis en ĉiuj esperantistaj renkontiĝoj,ferioj kaj kongresoj.

Lia longa esperantista vivo, pli malpli 25 jaroj,estis treege fruktedona,ĉar li impulsis per sia konstanta emo kaj amo al la esperantolibroj la eldonadon de ili en nia urbo.Lia belega esperanto-elparolado,lia afabla karaktero,lia pacienco,lia nekonfliktiva agado,estas por ĉiuj ni imitenda modelo.Ripozu pace.

Nia sincera kondolenco al lia edzino María Nogués kaj familianoj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Gaston Waringhien ,membro kaj eksprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj honora membro de UEA forpasis la pasintan 20an de decembro en Parizo. Ripozu pace.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Por la membroj kiuj deziras sendi sian kotizon,atentigu ke nia konto estas. Barcelona Esperanto-Centro, CAIXA BARCELONA, 5-198-104-31, Sant Frederic 1-3 ,Barcelona-08028.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Novaj Esperanto-Kursoj Komenciĝos la tagon 25an de Februaro je la 19,30 h.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-